




5*1991*146

STARTO

ORGANO DE CEHA ESPERANTO-ASOCIO



F. V. Lorenz

UK BERGEN 1991

La ĉijara universala kongreso de Esperanto en la norvega urbo Bergen (25.7.-4.8.1991) okazis sub la kongresa temo *Nordio - ĉu modelo?* Sub Nordio oni komprenas Danion, Norvegon, Svedion, Finnlandon, Islandon, Gronlandon, Feroajn Insulojn kaj Åland-insulojn. La landoj de Nordio malgraŭ diferencaj lingvoj kunlaboras sur la kampoj de ekonomio, kulturo kaj ĵuro kaj tiel vere povas servi kiel certa modelo por la cetera mondo. La kongreson kronis la fama emancipiga teatraĵo de la granda norvega dramverkisto Henrik Ibsen "Pupohejmo", konata ankaŭ laŭ la nomo de la ĉefa heroino "Nora". Ŝi estas virino estrata kaj humiligata de sia edzo, kiu vidas en ŝi nur sian am-ludilon, eĉ kiam ŝi savos lian vivon elpruntinte per falsa subskribo monon por kuraci lian malsanon - ŝi devas forlasi la pupohejmon por fariĝi vera homo. La verko siatempe grave kontribuis al egalrajtigo de virinoj kaj al venko de demokratio.

Nian asocion reprezentis la prezidanto d-ro ing. Petr Chrdle, kiu salutis la kongreson en la nomo de ambaŭ niaj asocioj (post interkonsento kun la slovaka reprezentantoj).

Definitive estis decidite organizi la venontan kongreson en Vieno anstataŭ en Prago, tamen en Prago okazos antaŭkongreso dediĉita al Komenio.

UK alte aprezis la IFEF-kongreson en Olomouc, pri kiu estis prezentata video-registro. Videofilmo en Esperanto-versio ekzistas ankaŭ pri la preparo de la vintraj olimpikoj 1996, kiam fervojistoj certigos trajnkonektojn inter la urboj Oslo, Hamar kaj Lillehammer (la videofilmo estas pruntebla kontraŭ poŝtkotizo).

La Esperantista klubo en Strážnice proponis al UEA aranĝi dum UK 1992 en Vieno unutagan ekskurson al la regiono de Komenio, kie tiutempe okazos internacia filatela ekspozicio kun temo *Komenio kaj interlingvistiko*.

Sinjoro Bormann proponis al d-ro Chrdle okazigi komunan konferencon de GEA kaj ĈEA en iu okcidentbohema urbo en 1993 aŭ 1994. Ankaŭ la slovakaĵ reprezentantoj montris intereson partopreni la konferencon. Plej probable ĝi efektiviĝos en Františkovy Lázně okaze de la 200-jara datreveno de la urbo en 1993, kiam estos reinaŭgurata ankaŭ la monumento al Zamenhof.

Dum la kongreso okazis multaj publikaĵ kaj nepublikaĵ kunsidoj, ekzemple de terminologoj, instruistoj, fervojistoj, filatelistoj, blinduloj, religianoj k.a., grava estis ankaŭ la Tago de Libro, kiam la eldonistoj povis prezenti siajn publikaĵojn (por la venonta jaro: anoncu almenaŭ 4 monatojn antaŭ la kongreso viajn eldonaĵojn kun ĉiuj bibliografiaj indikoj al Spomenka Štimec, estraranino de UEA por la kulturaj aferoj). Kulturaj programoj (teatraĵo, rokmuziko, folklora kaj klasika muzikoj, finn-pola filmo) okazis ĉiutage.

Dum UK 1992 en Vieno okazos novaj elektoj de la UEA-estraro.

La kongreson en Bergen partoprenis 2295 delegitoj el 53 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj.

Ministerio pri la instruado kaj Esperanto

Uĉitelské noviny č. 31, 28.8.1991:

MŠMT ČR

Pokud se na školy obrací organizace esperantistů se žádostí o vytvoření zájmové skupiny žáků pro výuku esperanta, ministerstvo školství, mládeže a tělovýchovy ČR doporučuje jejich žádostem vyhovět a poskytnout pro tuto činnost místnosti.

La supre prezentitan tekston publikigis la gazeto de ĉefaj instruistoj *Uĉitelské noviny* (Instruista gazeto), n-ro 31, de la 28-a de aŭgusto 1991, en la rubriko de la ministerio pri la instruado:

"Se organizaĵoj de esperantistoj turniĝas al lernejoj kun peto formi interesgrupojn de lernantoj por instrui Esperanton, la ministerio pri la instruado, junularo kaj korpekercado de la Ĉeĥa Respubliko rekomendas plenumi la peton kaj disponigi por tiu ĉi agado ejojn."

(mm)

UK Vieno kaj Lančov

La Esperantista klubo en Třebíč proponas al interesitoj pri la 77-a Universala Kongreso en Vieno (25.7. - 1.8.1992) loĝadon kaj manĝadon en SET Lančov kun ĉiutaga aŭtobusado al Vieno kaj reen (unu vojaĝo proksimume 90 minutojn). Prezo 2.300 Kčs inkludas loĝadon en Lančov kaj aŭtobusadon al Vieno. La kongresan kotizon ĉiu devas mem sendi al UEA.

Kotizoj por UK Vieno 1992:

pago ĝis 31.12.91 - ekde 1.1.92 - ekde 1.4.92			
individua membro de UEA	90	112	135
ne individua membro de UEA	112	135	158
kunulo (junulo), handikapulo,			
mem individua membro de UEA	45	68	90
kunulo (junulo), handikapulo			
ne individua membro de UEA	68	90	112

La prezoj estas en nederlandaj guldenoj. Unu guldeno respondas proksimume al 15 Kčs, tial do:

45 gld =	675 Kčs,	112 gld =	1.680 Kčs,
68 gld =	1.020 Kčs,	135 gld =	2.025 Kčs,
90 gld =	1.350 Kčs,	158 gld =	2 370 Kčs.

Mia patro, František Vladimír Lorenz, postlasis ĉirkaŭ 120 verkojn, inter ili pli ol tridek diverslingvajn manuskriptojn, kies titolojn oni ne povas scii, ĉar perdiĝis iliaj kovriloj.

La unua libro de Lorenz pri Esperanto aperis en la jaro 1890 en Pardubice, Bohemio, presita de Fr. Hoblík, je propra risko kaj propra mono de la aŭtoro. Ĝia titolo estis "PLENA LERNOLIBRO de la lingvo internacia de d-ro Esperanto, por Bohemioj, skribis Fr. Vl. L.". De tiu libro mi havas ekzempleron dank' al d-ro Bohumil Bažura de Praha, al kiu mi estas dankema!

Kiam mia patro alvenis en Brazilon, aĝanta nur 21 jarojn, li jam scipovis paroli kaj skribi perfekte 24 lingvojn, kiel rakontis al ni Da. Margarethe Schoenwald Schneider, de kies familio F.V.L. restis kelkan tempon laboranta.

En Brazilo li tiam estis sola homo, kiu konis Esperanton kaj varbis adeptojn por la movado.

Li publikigis grandan nombron da diversaj artikoloj, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, en Kolombio en la Katolika Revuo de Medellín. En Japanio li kunlaboris kun la revuo OOMOTO, redaktata de d-ro Onissaburo Degutshi. Kelkaj liaj libroj estis publikigitaj en la eldonejo "O Pensamento" de São Paulo, kelkaj aliaj en la eldonejo Federação Espirita, rua Souza Valente, n-ro 17 -- CEP 20941 - Rio de Janeiro.

La trian ĉapitron de la Evanĝelio de Sankta Johano li postlasis en pli ol 100 lingvoj (en la unua eldono de lia rimarkinda libro "Iniciacao Linguistica" en 1929 ĝi estis publikigita sole en 70 lingvoj).

Ankaŭ la preĝon "Patro nia" li postlasis en pli ol 100 lingvoj, ĉiuj en la originala skribo kaj kun preciza traduko kaj prononco.

La sanktan nomon de Dio li skribis en 365 lingvoj, por saluti Lin dum ĉiuj tagoj de la jaro. La Almanako Pensamento el 1930 publikigis parton de tiu verko, en 122 lingvoj. Ie estis publikigita la tuto, probable en Correio do Povo aŭ en la malnova Almanako.

El la originalo de la antikva lingvo sanskrito en Hindujo li verse tradukis en Esperanton la senmortan poemon BHAGAVAD-GITA, konservante la saman ritmon de la originalaj versoj.

La vere grava verko lingvistika "Iniciacao Linguistica", aperinta en 1929, en impona volumo riĉa je bildoj, donas al li grandan aŭtoritatecon pri lingvaj aferoj. En tiu verko li detale studas ĉiujn naturajn lingvojn, kaj en la fino li pledas por lingvo artefarita kaj pridiskutas la ĉefajn projektojn: "Universal Glot" de Pirro; "Volapük" de Schleyer; "Esperanto" de Zamenhof; "Ido" de Beaufort; "Occidental" de Edgar de Wahl, kaj fine li evidencigas la superecon de Esperanto.

Jen la listo de verkoj de F.V.L.

- | | |
|---|--|
| 1. Esperanto por Bohemioj, 1890 | 7. Homeopathia Doméstica Brasileira |
| 2. Gramatyka języka Portugalskiego, 1908 | 8. Contos e Apólogos, em 1910 |
| 3. Słownik Polsko-Portugalski, 1910 | 9. Pequeno Consultório Hermético, 1919 |
| 4. Ensinos Paternos, 1909 | 10. Nocões Elementares de Cabala |
| 5. Diálogos Iniciáticos | 11. No Jardim da Alma |
| 6. Receitaário dos Melhores Remédios Caseiros | 12. Moysée e Siphoráh, em 1920 |

- | | |
|---|---|
| 13. Krishna, o Salvador da Índia | 51. Dakota, Ossage |
| 14. Estenographia Ideal | 52. Marathi-Portugues |
| 15. Asorte Revelada pelo Horoscopo Kabalístico | 53. Chinuk e Siuslawan |
| 16. Elementos de Chiromancia | 54. Macuchi e Kashiana |
| 17. O Filho de Zanon | 55. Cakchiquel |
| 18. Chamas de ódio e a Luz do Puro Amor 1927 | 56. Micmac |
| 19. Um Apóstolo de Progresso | 57. Mapuche |
| 20. Pequena Antologia Tcheca, em 1928 | 58. Aimará |
| 21. A Mentalidade Ameríndia, em 1921 | 59. Huitoto e Megat |
| 22. Iniciação Linguística 1929 | 60. Kvakiutl |
| 23. Licoes Práticos de Ocultismo Utilitário, 1942 | 61. Eskimó |
| 24. Raios de Luz Espiritual, em 1944 | 62. Quiché |
| 25. A Voz de Antigo Egito, 1946 | 63. Haida |
| 26. Mensagens Rosacrucianas | 64. Navajo |
| 27. Diverskolora Bukedeto 1941 | 65. Algonkin (Meskwa) |
| 28. Esperanto Sem Mestre 1945 | 66. Chukchee |
| 29. Voĉoj de Poetoj el la Spiritita Mondo, 1944 | 67. Takelma |
| 30. La Brazila Aruakoj | 68. Maidú |
| 31. Kompleta Gramatiko de la Tupia lingvo | 69. Almanaque d'O Pensamento ekde 1912 ĝis 1964 (kompletigita post lia morto en 24.5.1957) |
| 32. Brazilia Antologio Poezia | 70. Monogenismo Linguístico (2000 pagoj en pli ol 80 lingvoj - en manuskripto) |
| 33. Bhagavat Gītā (Esperante) | 71. Esperanto kiel Revelacio (diktitaj al medio Chico Xavier de la spirito de F.V.L. el la spiritala mondo, 1976) |
| 34. Lingua "Ido" (Gramatiko e Dicionário), 1913 | 72. Estrenua Vida Espirituale a Vida Submissa |
| 35. Viagens no Mundo dos Espíritos | 73. 14 Licoes de Filosofia Yogi e Ocultismo Oriental |
| 36. Deutsch-Chinesisch, Chin.-Deut. Wörterbuch | 74. Curso Advantado de Filosofia Yogi a Ocult. Oriental |
| 37. Deutsch-Japanisch, Jap.-Deut. Wörterbuch | 75. A Vida Depois da Morte |
| 38. Vocabulário Portugues-Egípcio | 76. Raja Yoga |
| 39. Vocabul. Persa-Portugues | 77. A Ciência da Cura Psíquica |
| 40. Vocabul. Basco-Portugues | 78. Gnani Yoga |
| 41. Vocabul. Turco-Portugues | 79. O Cristianismo Místico |
| 42. Vocabul. Yoruba-Portugues | 80. Filosofias e Religiões da Índia |
| 43. Árabe-Hebraico-Portugues | 81. O Renascimento e a Lei do Karma |
| 44. AINU-Mongól.Mandchú | 82. Estudo da Religião |
| 45. Tibetano-Tamil... | 83. Da Pobreza ao Poder |
| 46. A Lingua Tigré (Província da Etiópia) | 84. Zanon, romance ocultista |
| 47. Hupa (Hu-pé é uma província da China) | 85. Bhagavad Gītā |
| 48. Etrusco-Rásena | 86. O Labirinto do Mundo e o Paraíso dos Corações de Jan Amos Komenský |
| 49. Malaio-Portugues | 87.-120. verkoj kun perdiĝintaj kovriloj |
| 50. Maya-Portugues | |

Waldemaro Lorenz

LA BRAZILAJ ARUAKOJ

Etnografia studaĵo, antaŭata por klasifiko de la Brazilaj Indianoj. Kontribuaĵo al la Festo de la CENTJARO DE ESPERANTO - 1987. Verkis Francisko Valdomiro Lorenz (1872 - 1957). Unua eldono: 1983, Laborgrupo "Antaŭen", Brazilia. 22 x 15 cm, 52 paĝoj, serio "Cadernos Brasileiros" n-ro 3

Recenzo de Jaroslav Mařík

En 1990 ni rememoris la centjaran ekziston de la unua lernolibro de Esperanto "por Bohemoj" de František Vladimír Lorenc. La aŭtoro, ĉeĥo kaj poste braziliano, postlasis 83 titolojn de siaj verkoj, inkl. de negrandaj laboraĵoj, el kiuj granda parto restas nur en la manuskriptoj. El tiuj la studaĵo pri Aruakoj estas eldonita postmorte.

Post la aruaka alfabeto, kun unu supersigno, unu apudsigno kaj unu subsigno, en la sekvanta frazaro ĉoketas nin la konjunkcio "kai" - ĝi ja estas ekvivalento de la Esperanta kaj (!). Ni citu unu frazon (ch=c; ñ = nj, aŭ ñ; w = proksimume ŭ; y = j):

Inche nien kiñe pichi kawella kai kiñe fiichá kawella.

(Mi havas unu malgrandan ĉevalon kaj unu grandan ĉevalon).

La vorto *kawella* estas evidente latindevena, transprenita pere de la portugala: *caballus* - ĉevalo nebona; ĉeĥe *kobyła*).

La komenco de la Patro Nia sonas jene:

Inchiñ taiñ chao, hwen meu mi' elu, sakingeay tami gluvjo ...

En la ĉapitro Klasifiko de la brazilaj Indianoj oni dividas ilin en deksep popolfamiliojn, el kiuj ni citu la grandajn. Aruaka, Gvajkurua, Ĵea, Kariba, Panaa, Tukana, Tupi-gvarania. Pli detale priskribitaj ol aliaj estas la Aruakoj. (La majusklo ĉe la popolonimo uzas la aŭtoro.) Sekvas priskribo de ceteraj sep grandaj popolfamilioj, kiuj dividiĝas je triboj; inter ili mi

konas ĝis nun la nomon Botokudoj (el la popolfamilio Jeej), vivantaj en la ŝtatoj Minas Gerais kaj Espírito Santo.

La Aruakoj estas la plej grava el la lingvofamilioj de Sudameriko. Ili loĝas ekde la sudo de Florido ĝis la nordo de Paragvaio kaj ekde Pacifiko ĝis la enfluo de Amazono en Atlantikon. Sekvas difino pri la loĝlokoj de 119 triboj kaj subtriboj aruakaj. Unu trajto komuna unuigadis ilin: la agrikulturo. Manioko kaj maizo estis la precipaj cerealoj, kiujn ili kulturadis kun vera scienco. Tiuj triboj formis veran konfederacion, en Manaus, la nuna ĉefurbo de la ŝtato Amazono. Estis granda la gastameco aruaka. La gasto estis akceptata kun majesta ceremonio. La geedzeco estas monogamia kaj ne dissolvebla post la naskiĝo de la unua infano.

La sekvantaj ĉapitroj estas dediĉitaj al la aruakaj grupoj; parikia, jauperia, maska, tikuna, manaua, ĉanea, pakalalaa kaj paresia. Atentokaptaj estas la ĉapitroj pri la ĉanea kaj paresia lingvoj, kun bazaj vortaretoj, en kiuj la unuopaj vortoj almontras similecon kun aliaj tribaj lingvoj.

La 11-a ĉapitro reliefigas unu el la ruĝhaŭtulaj herooj, la junan Pakalalá, lernintan en katolika misiista lernejo, atingintan admiregon de siaj kunrasanoj kaj ŝaton de la blankuloj. - (Mi trovas, ke la geedziĝa ceremonio de Paresioj, propranome Arití, kaj la ceremonio konversacio ne estas mal-

similaj al nia tiuspeca ceremonio). Enore estas Dio de Paresioj kaj kreis la unuan geedzan paron el arbotrunkoj. Liaj du filoj fariĝis prapatroj, Zaluĵé de la Indianoj, Kamajkoré de la blankuloj.

Laŭ la vidpunkto de kompara lingvistiko interesaj estas la ĉapitroj pri la ĉanea kaj paresia lingvoj, kiuj montras vere mirindan filologian spertecon de Lorenz. La unuopaj vortoj de la baza vortareto montras similaĵojn kun vortoj en vico da lingvoj. Ni elprenu unu el la vortoj: **AVO** - atiutú; kp. ĉokoa - **táta**, baska (vaska) - **aitaso**, umaha - **itigô**, kvakiutla - **ntseets**, rusa kaj ĉeĥa - **děd** (djed), turka - **dede**, araba - **gēd**, japana - **didi** (ĝigi). - Ĉe la vorto **GLACIO** la aŭtoro atentigas pri la tiuspecaj esprimoj madjara, suomia kaj estona, hindustana, germana, holanda, dana sveda, angla. Ĉe la vorto **AVINO** ni rimarku: **abobé**; kp. slava kaj japana: **baba** (!).

Ĉe tranĉi, haki estas jenaj komparoj: **parsie** - **inkutiá**, araukane - **katrūn**, atakape - **kōts**, angle **cut** (pron. **kat**), ĉine - **kot**, arabe - **kata'**, hebree - **gada'**, hindustane - **katnā**, suahile - **kata**, kaire - **quat**, kalcikele - **khat**, keĉue - **k'utu**, greke **kópio**, aname - **kat**. - Okulirapaj estas la sameco aŭ simileco de la substrekitaj silaboj. Tiu admirinda elserĉo argumentas pri la alta lingvosperto de Lorenz.

Vere nekutima lingvoriĉo de unu homo. En dulingva (portugala kaj Esperanta) verko de F. X. Xavier "O Esperanto como revelação - Esperanto kiel revelacio" (Araras, 1976) la aŭtoro diras (p. 101): "Ĉe sia morto Lorenz scipovis 104 idiomojn". El alia fonto ni scias, ke Lorenz verkis la unuan gra-

matikon de la tupia lingvo. Ĝi restis nekonata antaŭ la mondo, ĉar estas nur en manuskripto. En la 50-aj jaroj praga etnografo kaj lingvisto publikigis propran tupian gramatikon, ne sciante pri la laboraĵo de Lorenz. (Tamen mi atentigis pri ĝi la Etnografian muzeon en Praha.)

La verkon finas ĉapitro pri aruakaj artaĵoj kaj bibliografio de 20 verkoj pri la brazilaj Indianoj. Inter ili estas: F. V. Lorenz - A mentalidade Amerindia, S. Paulo 1938.

La 52-paĝa etnografia studaĵo, en bona lingvaĵo, montras universalecon de la spirito de F. V. Lorenz. Estus dezirinda eldono de pluaj el la manuskriptoj kuŝantaj ĉe la filo Waldemaro en Porto Alegre.

Al la patrino

(kanton Ŝatatan en Paragvaio tradukis F. V. Lorenz el la gvarania lingvo)

Mia kara patrineto,
version teksas mi por ci,
en ĉi tiu vorto-reto
kantu mia emoci'.

Multan zorgon, amon koran,
havis mi de cia man',
kiam estis mi ankoraŭ
cia malgranda infan'.

Kiel povus mi repagi
kion faris ci por mi?
Mi ne povas eĉ imagi
ke min iu amus pli.

(El la kolekto Diverskolora bukedeto)

La faŭno de nia lando estis antaŭe alia ol nun. Multaj specioj malaperis, precipe ekstermitaj fare de homo. Sed en nia nuntempa faŭno estas specioj, kiuj ĉi tie antaŭe ne estis. Iujn el ili importis la homo, aliaj aperis ĉe ni spontanee.

El grandaj animaloj tio estas ekzemple muflono. Ĝi origine vivis en Korsiko kaj Sardinio, en pasintaj jarcentoj ĝi estis importita en diversajn landojn de Eŭropo, ankaŭ al ni. Ĝi origine vivis nur en ĉasbararoj, nun ĝi vivas ankaŭ en libera naturo, en arbaroj.

En montaroj, ekzemple en la montaro Pálava en suda Moravio, vivas sovaĝa kapro. Ĝi estis importita en ĉi tiu jarcento el Malgrandazio.

Ĉamo vivas ĉe ni kiel origina animalo en Tatroj. Nun ĝi vivas ankaŭ en la montaroj Lužické hory kaj Jeseníky. La ĉamoj reen estis importitaj al Alpoj.

Neorigina ĉe ni estas ankaŭ damcervo. Origine ĝi vivis en Mediteranea regiono kaj en Malgrandazio, en la mezepoko ĝi estis importita en nian landon kaj bredata en ĉasbararoj. Nun ĝi vivas ĉe ni ankaŭ en libera naturo.

Precipe en ĉasbararoj vivas ĉe ni sikcervo, origine el Japanio.

Ankaŭ kuniklo ĉe ni origine ne vivis. Ĝi origine vivis en Mediteranea regiono. Antikvaj Romianoj ĝin disvastigis en tutan sian imperion kaj al ni ĝi venis spontanee.

El Nordameriko estas ondatro. En la jaro 1905 importis grafo Coloredo-Mansfeld kelkajn parojn en fiŝlagojn apud Dobruŝa. Ondatroj baldaŭ poste vivis en la tuta Bohemio kaj nuntempe ili vivas en la tuta Eŭropo.

Rato vivis origine en sudorienta Azio. Dum lastaj jarcentoj ĝi disvastiĝis en la tu-

tan mondon.

Fazano devenas el Kartvelio, de kie ĝi dum la mezepoko estis importita.

Rokkolombo origine vivis laŭ rokaj marbordoj de okcidenta kaj suda Eŭropo. Ĝi iĝis dombirdo kaj en multaj urboj denove sovaĝiĝis.

Turka turto nuntempe vivas ĉe ni jam ĉie, sed komence de dudeka jarcento ĝi en nia lando ne vivis. Ĝi disvastiĝis spontanee el Balkano.

Simile venis en nian landon sovaĝa kanario el suda Eŭropo.

Karpo vivis en nia teritorio origine nur en Danubo. Komence de la mezepoko oni komencis bredi ĝin en fiŝlagoj kaj nuntempe ĝi vivas en la tuta Eŭropo kaj en multaj aliaj regionoj de la mondo.

Fine de la pasinta jarcento estis importitaj en niajn akvojn kelkaj specioj de fiŝoj: ĉielarka truto, salvelino, iktaluro kaj mikroptero el Nordameriko kaj mareno el nordgermanaj lagoj. Spontanee venis en nian landon sunfiŝo, kiu estis importita en Eŭropon el Nordameriko. En pasintaj dekjaroj oni importis herbovorajn fiŝojn el orienta Azio. Kune estis nedezire importita ankaŭ pseŭdorazboro.

El neoriginaj insektoj vivantaj ĉe ni estas la plej konata terpoma krizomelo. En Eŭropo ĝi aperis fine de la pasinta jarcento, nuntempe ĝi vivas en la tuta Eŭropo.

Ankaŭ diversaj specioj de blatoj ne estas en Eŭropo originaj. Iliaj hejmlandoj estas Ameriko, suda Azio kaj Aŭstralio.

Kiel oni povas vidi, en nia lando aperis diversaj novaj animaloj. Iuj el ili estas utilaj kaj estas la riĉiĝado de nia naturo, iuj de ili estas malutilantoj kaj faras grandajn problemojn.

VORTARETO:

animalo - zvíře
blato - šváb
ĉamo - kamzík
ĉasbararo - obora
ĉielarka truto - pstruh duhový
damcervo - daněk
ekstermi - vyhubit
faŭno - zvířena
fazano - bažant
herbovoro - býložravý
iktaluro - sumeček americký
kanario - kanár
karpo - kapr
kuniklo - králík
mareno - maréna
mikroptero - okounek pstruhový
muflono - muflon
naturo - příroda
ondatro - ondatra
pseŭdorazboro - střevlička východní

rato - krysa, potkan
rokkolombo - holub skalní
salvelino - siven
sikcervo - jelínek sika
sovaĝa kapro - divoká koza
specio - zoologický druh
sunfiŝo - slunečnice pestrá
terpoma krizomelo - mandelinka bramborová
turto - hrdlička



BEJK 1992

La 13-a Kongreso de Brazila-Junularo okazos de la 19-a ĝis la 26-a de januaro 1992 en la brazila urbo Barra de Garças, ĉe la mistera rivero Araguaia. La kongresa temo estos SPORTA, KULTURA, EKOLOGIA EDUKADO. Entute 36 paradizaj akvofaloj je via dispoŝo por kompleta feliĉo, amindumado, amorado kaj ekstazo ... La gejunuloj emas grimpi montarajn tuttagajn ekskursojn al la Valo de Akvofaloj kaj Rivereto de la Bateja, paradiza regiono, kie fiŝoj naĝas en tepida kristala akvo. Nepre kunportu fotilon. Oni konkuros ankaŭ pri piedpilko, naĝado, tablotenis, ŝakludo kaj kanuado, realigos prelegojn pri kulturo, sporto, ekologio kaj esperantologio. La vesperoj estos dediĉitaj al artaj kabaredoj (kantistoj kaj gitaristoj anoncu vin!). La kongresurbon vi atingos per aviadilo, helikoptero, aŭtomobilo aŭ buso. Nekonsilinde per rikiŝo, biciklo, raketo, kamiono aŭ azeno! Pluajn informojn donos: Tuka, prezidantino de BEJO, Caixa Postal 55030, BR-04799 Sao Paulo - SP, Brazilo.

Izmael Gomez Braga

La 14-an de julio 1991 pasis cent jaroj ekde la naskiĝo de la plej granda brazila esperantisto, Izmael Gomez Braga, kunlaborinto de nia fama F. V. Lorenz, verkanto, tradukanto, eldonanto kaj instruanto de Esperanto. En lia naskiĝurbo Ubá oni starigis al li buston en la centra Placo de la Sendependenco.

*** HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA ***

Inĝ. Jaromír Řebíček naskiĝis la 20-an de marto 1908. En la Esperanto-movado aktivis ekde la j. 1920. En la j. 1929 sukcese trapasis la fakan ŝtatan ekzamenon pri Esperanto en la Ĉeĥa Teknika Universitato en Praha. De sia junaĝo li aktive partoprenis en Esperanto-kongresoj kaj kunvenoj hejme kaj eksterlande. Sed precipe li dediĉis sin al la evoluigo de faka terminologio.

Post la 2-a mondmilito li estis regiona reprezentanto de ĈSEA. Por la evoluo de Esperanto li vigle laboris eĉ en la jaroj, kiam Esperanto ne estis favorata. En la j. 1959 li iniciatis fondon de la Esperanto-rondo en Havlíčkův Brod. Li aktive laboris ankaŭ por la propagando de Esperanto en gazetaro, intense sin dediĉis al publikigado kaj precipe al instruado kiel instruisto kaj de plenaĝuloj kaj de junularo. Li estis iniciatinto kaj ĉefmotoro de multaj Esperantaj ekspozicioj.

Tamen la ĉefa merito de inĝ. Řebíček estas, sendube, lia laboro kaj verko en la sfero de la fervojista terminologio, pro kio li ricevis la titolon Honora Membro de ĉs. sekcio de IFEF ĉe la Ministerio por trafiko kaj komunikado (kiu ekde la j. 1969 apartenas al ĈEA kiel ties fervojista sekcio) kaj en la j. 1979 li estis nomita Honora membro de IFEF.

Eĉ hodiaŭ, en la aĝo de pli ol 80 jaroj, inĝ. Řebíček estas ĉiam ne nur alte kvalifikita konsilanto de la terminologia komisiono de IFEF kaj de la terminologia grupo de FS ĈEA, sed ankaŭ de la Esperanto-rondo en Havlíčkův Brod. Krom tio li ĉiam estas afable preta kaj lingve perfekta gvidanto kaj informanto por esperantistoj, kiuj alvenas al Havlíčkův Brod kaj ties ĉirkaŭaĝo.

Inĝ. Řebíček estas tre modesta homo - tamen li ege meritas pri evoluo de Esperanto precipe sur la kampo de scienco kaj tekniko.

František Sedláček naskiĝis la 20-an de marto 1909, esperantisto estas ekde la jaro 1946. Ekde la j. 1948 li funkciis kiel inspektoro de kulturo ĉe la distrikta nacia komitato en Třebíč. Kiel tiu funkciulo li ĉiam intense subtenadis la Esperanto-klubon en Třebíč, kies membro li estis. Dum la kvindekaj jaroj li defendis la interesojn de la klubo kaj iniciatis ties enigon en la Domo de Kulturo. Pli poste li mem fariĝis direktoro de la Domo de Kulturo kaj ebligadis al la klubo ricevi subvenciojn. En la jaroj, kiam estis minacata SET en Lančov, li faris ĉion eblan por tio, ke la tendaro ne malestiĝu kaj ke ĝi povu plenumi siajn taskojn ĝis nun.

Ekde sia peniĝo li aktive partoprenas en la preparoj de SET en Lančov kaj poste kiel instruisto de Esperanto. Li estis kunlaboranto de prof. Kilian kaj sugestis al li la ideon verki la tendaran lenolibron "ABC" kaj aliajn publikaĵojn. En la tempo, kiam la eldonado de Esperantaj publikaĵoj ne estis facila afero, li prizorgis, ke ĉiuj publikaĵoj de la klubo estu eldonitaj.

S-ano František Sedláček grave meritis pri la evoluo de Esperanto-movado en Třebíč kaj en Ĉeĥoslovakio dum la pluraj jardekoj. Li mortis la 10-a de aŭgusto 1991.

Adolf Staňura naskiĝis la 12-an de marto 1915 en Radvanice, nun urba kvartalo de Ostrava. Li studis komercan akademion kaj laboris ĝis 1975 kiel oficisto. Esperanton li ellernis kiel 14-jara knabo, poste dum kelkaj jaroj vizitadis la E-klubon en Slezská Ostrava. En 1933 li estis kunfondinto de la Esp.-Societo Nova Vivo en Radvanice, en kiu li post milito fariĝis ĝia prezidanto. En la jaroj 1945-49 li verkis kaj tradukis paroladojn por la Esperanto-elsendo de radiostacio Ostrava, en kiu li ankaŭ voĉlegadis kun s-anoj Vladimír Slaný kaj Zdeněk Raška.

Ĉar li tre interesiĝis ankaŭ pri stenografio, li adaptis la ĉeĥan stenografian sistemon Herout-Mikulík al Esperanto (eldonis ĝin EA ĈSR en 1950). Tiam komenciĝis lia kunlaboro kun stenografiaj institutoj en Praha kaj Bratislava, por kiuj li helpe de Esperanto akiradis informojn pri stenografiaj sistemoj en eksterlando. Li aktive kontribuis ankaŭ al ĉeĥaj kaj slovakaĵoj lernolibroj pri stenografio lige al Esperanto kaj al la internacia stenografia sistemo Intersteno.

En 1959 A. Staňura transloĝiĝis al Ostrava-Poruba kaj tie fariĝis prezidanto de la loka E-klubo ekde 1967. En 1979 li estis nomita kiel gvidanto de Lingva komisiono de ĈEA. En tiu funkcio li vaste kunlaboris kun redaktaj komitatoj de asociaj presaĵoj. Gravan laboron li faris sur la literatura kampo. Unu el liaj plej gravaj tradukoj estis la lasta ĉapitro el la libro de K. Čapek "Vivo kaj verko de komponisto Foltýn", kiu aperis baldaŭ post la milito en Malgranda revuo, eldonita fare de svedo Stellan Engholm. En la jaro 1971 aperis en franca junulara gazeto La juna penso 4 kontraŭmilitaj noveloj de Josef Nešvadba sub la titolo La tabuo kaj en 1973 eldonis ĈEA volumon kun 10 noveloj de la sama aŭtoro sub la titolo "La perdita vizaĝo". Ekde 1979 Staňura skribis multajn artikolojn, recenzojn kaj kritikaĵojn pri Esp. libroj por Starto. En kvar volumoj de sciencifika libroserio Sferoj, eldonata en hispana Santander, aperis po unu rakonto de ĉeĥaj verkistoj, kiujn tradukis en Esperanton s-ano Staňura. Li kompiladas ankaŭ krucvortenigmojn por E.-gazetoj kaj liaj ĉeĥaj enigmoj estas publikitaj en la gazeto Hádanka a křížovka - ofte kun Esperantaj vortoj kaj kun informoj pri Esperanto.

En la jaro 1979 li ricevis honorinsignon de MEM, en 1982 honoran diplomon de ĈEA kaj en Havířov 1989 ankaŭ honoran membrecon de ĈEA.

(kov.)

Drahomír Kočvara naskiĝis 29.1.1929 en vilaĝo Dobrá, distr. Frýdek-Místek. Li ellernis la metion de aŭtomekanikisto kaj poste studis mezan industrian lernejon. Li fariĝis majstro de metilernantoj. Esperanton li ellernis en la j. 1947 en Ostrava kaj en 1948 li membriĝis en tiea E.-klubo, en ĝia junulara grupo. En 1949 li partoprenis la Someran Esperanto-Lernejon en Rožnov p. Radhoštěm kaj en la sekva jaro li jam funkciis en ĝia preparkomitato. Danke al siaj organizaĵoj kapabloj kaj entuziasmo li baldaŭ fariĝis ĉefpersono de vigla junularo en Ostrava - komencis funkcii kiel regiona gvidanto kaj poste li estis elektita kiel membro de gvidantaro de Esperanto-junularo de Ĉeĥoslovakio. Li partoprenis la eldonadon de la junulara bulteno "Tagiĝo", malpli frue "Junularo agu", instruis Esperanton en

lernejoj, uzinaj kluboj en Ostrava, sed dum militservo ankaŭ en Val. Meziříčí kaj Přerov. Post malapero de SEL en Rožnov li organize kunlaboris ĉe preparoj de someraj E.-tendaroj en Žimrovice apud Opava, Chvalatice, Lančov kaj aliaj, kie li ĉiam plenumis diversajn funkciojn (instruisto, programestro, tendarestro ktp.). En 1959 li fariĝis 1-a vicprezidanto de la asocio kaj tiun funkcion li plenumis ĝis la j. 1970. En kadro de ĈEA li komencis aktivi sur la sfero de porpaca laboro kaj fariĝis prezidanto de Porpaca sekcio de ĈEA. Li estis ankaŭ membro de Internacia komitato de MEM kaj en la jaroj 1973-75 li plenumis funkcion de ĝia ĝenerala sekretario.

Li fariĝis konata kaj oferema Esperantisto kaj propagandisto de ideo de E.-movado - li ĉeestis multajn gravajn movadajn kaj ankaŭ ekstermovadajn renkontiĝojn kiel delegito de E.-movado. Inter tiuj 7 universalajn kongresojn, naciajn kongresojn kaj pacajn renkontiĝojn en Ĉeĥoslovakio kaj en multaj aliaj landoj. Li ricevis honoran insignon de MEM, honoran diplomon de ĈEA kaj poste en Havířov (1989) ankaŭ honoran membrecon de ĈEA.

Li meritis pri la esp. movado en Ĉeĥoslovakio ĉefe en la tempo por ĝi tute malfavora kaj malgraŭ tiaj kondiĉoj li grave kontribuis al ĝia disvolvigo.

(kov.)

Daŭrigota.

Fondaĵo PANGEA

La 400-a datreveno de la naskiĝo de Komenio inspiris plurajn Ĉeĥoslovakajn sciencistojn establi fondaĵon PANGEA, kiu divolvus la Komenian heredaĵon, precipe la Ĝeneralan konsulton pri rebonigo de la homaj aferoj (*De rerum humanarum emendatione consultatio catholica*). Por la jaro 1992 ili intencas kunvoki al Prago internacian Ĝeneralan Konsultiĝon de sciencistoj, filozofoj, artistoj, politikistoj, entreprenistoj kaj de aliaj eminentuloj el la tuta mondo por apliki la rebonigan ideon de nia granda pedagogo kaj filozofo al la nuntempa civilizo. La establintoj de la fondaĵo petas helpon kaj subtenon per aktivado aŭ eĉ membriĝo en la fondaĵo.

Se la ideo realiĝos, certe ne devus manki esperantistoj, ĉar internacia lingvo estas unu el gravaj partoj de la genia reboniga plano de Komenio. Anoncon pri PANGEA alportis la gazeto de Ĉeĥoslovaka kaj Slovaka Akademioj de Sciencoj *Vesmír* (Universo) en la 9-a numero, 1991. La alvokon de la establintoj de la fondaĵo subskribis en aprilo 1991 akad. arh. Gorazd Čelechovský kaj MUDr. Miroslav Holub, DrSc. Informojn je la adreso de la redakcio: *Vesmír*, Jungmannova 12, 110 00 Praha.

Sekcioj kaj societoj de ĈEA prezentas sin al vi:

SEKCIO DE NATURPROTEKTANTOJ malgraŭ konsiderindaj malfacilaĵoj renovigas sian agadon, la ĉefa centro estos en Jeseníky. Provizore ne eblas paroli pri detala plano de aktivado, pri la organiza regularo. Por ĉi tiu jaro estis preparitaj sole du aranĝoj:

- plantado de arbedo apud la kabano Barborka dum la suprenmarŝo de esperantistoj al Praděd la 29-an de junio 1991;
- interkonatiĝa semajnfino kaj laborbrigado sur Rejvíz en aŭgusto 1991.

La komitatanoj:

- prezidanto: Stanislav Droppa (Rapotín),
- vicprezidanto: Štefan Takáč (Uničov),
- kasistino: Milena Takáčová,
- revizoro: J. V. Otta (Šumperk)

Supozataj ĉefaj orientiĝoj de la sekcio:

- a/ ligo de kontaktoj kun slovaka E-sekcio de naturprotektantoj,
- b/ kunlaboro kun la E-movado VERDA HELPO en la kadro de Jeseníky,
- c/ akiro de sufiĉa nombro de interesitoj pri la laboro kaj aktivado de la sekcio.

Aniĝilojn akceptas: Štefan Takáč, Hrdinů 1158, 783 91 Uničov

ASOCIO DE ESPERANTISTOJ-HANDIKAPULOJ daŭrigas sian celkonscian agadon nun jam kiel registrita, nepolitika societa organizaĵo kun jura subjektiveco kaj kun la sidejo en la urbo Slaný. AEH klopodos disvastigi kaj stabiligi la membrobazon el la vico de membroj de Asocio de Handikapitoj, kunlabori kun kluboj, kun lokaj, naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj.

Laŭ la statuto de AEH eblas establi lokajn klubojn, regionajn kaj landajn sekciojn, fakajn klubojn (ekz. de junularo, tradukistoj, gazetaraj, informaj k.s.), sekve ĉiuj ĉi niaj nove formiĝantaj komponantoj bonvenigos la kunlaboron kaj subtenon de jam ekzistantaj organizaĵoj de esperantistoj en tiu aŭ alia urbo.

Ni konscias, ke la komunan celon, t.e. venkigo de Esperanto kiel rekonata, tutmonda lingvo, ni povas atingi sole kune kun ĉiuj ĉe ni jam ekzistantaj societoj de ĈEA, de Junák (skoltoj) k.a., tial ni ĉiamaniere informas pri la agado de handikapuloj ankaŭ la vastan publikon.

Reprezentantoj de la preparkomitato de AEH estas s-ro Josef vaněček kaj s-ino Jana Malínková, adreso: 274 01 Slaný, Soukenická 58.

-JP-

TOURGAST kaj ĈEA

Vizitantoj de nia asocia sekretariejo en la strato Jilská en Prago povis konstati en aŭgusto 1991, ke en la unua asocia ĉambro sidas la vojaĝ-agentejo TOURGAST, la dua ĉambro estas ĉiam kovrita per fera kurteno, mankas ankaŭ la tabulo de ĈEA sur la muro...

Do kien malaperis la sekretariejo de nia asocio?

Ĝis julio okazis en la sekretariejo rekonstruo, estis riparitaj la muroj, instalitaj novaj lumoj. Ĉar la lumono por la ĉambroj kelkoble altiĝis, la asocio estis devigita vicluigi la unuan ĉambron al TOURGAST kaj lasi por si la duan, pli grandan ĉambron, de kiu kondukas pordo al granda stokejo kun libroj. Ĝuste pro la libroj la asokurejo ne permesis levi la feran kurtenton kaj liberigi la duan enirpordon kaj montrofenestron antaŭ ol estos instalitaj kradoj kaj speciala seruro. La menditaj metiistoj promesis veni en septembro.

Kaj la tabulo el la surstrata muro? Ĝin neniiĝis vandaloj, verŝajne pro la kvinpinta stelo (la inteligento de ĥuliganoj ne sufiĉas por diferencigi inter la ruĝa kaj verda koloroj, tial estos pli saĝe uzadi anstataŭ stelo la novan



simbolon akceptitan dum UK Varsovio 1987.

Esperable, kiam estos eldonita tiu ĉi numero de Starto, ĉio jam estos en ordo. La dua enirpordo libera kaj la montrofenestro plena de allogaj esperantaĵoj!

Kial malfruiĝis STARTO? Ĉar ni ne estis kontentaj kun presejoj en Prago, ni trovis novan presejon apud Hodonín en suda Moravio kaj ankaŭ laboremajn homojn, kiuj certe kapa-

blus STARTOn dissendi tuj post la presado. Sed aperis nova problemo - la poŝta permeso sendadi STARTOn por malpliigita poŝtafranko kiel presaĵo validas nur por Praga poŝto kaj de nove ni devis petskribi al la poŝta direktorejo en Brno. Tial la tria numero de STRATO, presita kaj preparita por dissendo jam meze de julio, devis atendi ĝis septembro. La novaj ekonomiaj kondiĉoj ne evitas ankau nian movadon kaj metas en nian vojon oftajn kaj iam ankau neatenditajn obstaklojn. Ni petas komprenon kaj paciencon.

DIO BENU

estas nomo de la nova bulteno de ĉeĥaj katolikaj esperantistoj, redaktata de Miloš Šváček, prezidanto de la ĉeĥa IKUE-sekcio.


Ĝi alportis informon, ke fine de la pasinta jaro la kongregacio en Vatikano aprobis Esperanto-version de la misalo kaj de la lecionaro, t.e. de la legaĵoj dum la Sankta mezo. En aŭgusto 1991 en la pola Ĉenstohova la papo Johano Paŭlo dum la monda renkontiĝo de katolika junularo la unuan fojon salutis la amasojn ankau en Esperanto inter kvindeko da aliaj lingvoj. (jl)

III-a ŜAK-OLIMPIKO ESPERANTISTA estis okazigita fare de Ŝaka sekcio de ĈEA en Poděbrady (5.-13.7.1991). Dek grupoj konsistantaj el 52 ŝakistoj batalis ĉe kvar ŝaktabuloj en la Agrikultura mezlernejo. La ŝakistojn akceptis ankau la urbestro ing. M. Tomek. La vitrofabriko Bohemia invitis ilin al trarigardo kaj sur la muro de hotelo Hubert estis inaŭguritaj du memortabuloj: okaze de la 80-a datreveno de Esperanto-kursoj en Poděbrady, efektivitaj en tiu domo, kaj okaze de

la ĵusa III-a Ŝak-olimpiko.

La rezultoj:

1. Litovio (28,5 poentoj),
2. ĈSFR (23), 3. RSFR (22,5),
4. Germanio A (21), 5. Pollando (20), 6. Rumanio (17,5), 7. Pollando - blinduloj (16), 8. Internacia grupo Usono, Nederlando, Belgio (13,5), 9. Germanio B (11), 10. Poděbrady (8).



Esperantista UNESKO-asocio

Dum la UK en Bergen ĉirkaŭ 60 personoj pertoprenis fondkunvenon de nova internacia asocio kun la nomo "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo". En sia mesaĝo al UK, ankau la ĝenerala sekretario de UNESKO F. Mayor aparte bonvenigis la fondon de tiu UNESKO-asocio. Por publikigi siajn ideojn kaj projektojn, Monda Kunagado eldonas la revuon "Monda Forumo". La kvin elektitaj konsilantoj estas: Märtha Andréasson (S), Ulrich Becker (D), Eva Bojašieva (BG), Mark Fettes (NL), kaj Lev Medvedev (SU). Kiu ŝatas kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de "Monda Forumo", skribu al: Ulrich Becker, KÜstriner Str.3, 0-1092 Berlin.

NORDA PRISMO

(intervjuo)

Pri la revivigita literatura revuo Norda Prismo intervjuis ĝian ĉefredaktoron, s-on Jukka Pietiläinen, dum la 28-aj Baltaj Esperanto-Tagoj en estona urbo Tartu (8. - 15.7.1991) s-on Artur Kubulnieks. Ni volotege aperigas la intervjuon por informo de niaj legantoj:

Kion celas Norda Prismo?

La revivigita Norda Prismo celas esti Nordia Kultura Revuo, sed ne neglektas ankau ekster-nordian materialon. Mia celo estas fari el ĝi popolan kulturan gazeton, de kiu la ordinara literaturamanto povas trovi interesajn materialojn.

Kiel eblas aboni Nordan Prismon?

Proveksempleron vi povas peti de la eldonanto Lasse Kivistö (Mendoservo AK), Kivistöntie, Osoio Hyvinkää, Finnlando

Kien sendu Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj siajn verkojn por Norda Prismo?

Al mi. Jen estas mia adreso: Jukka Pietiläinen, Puutarhakatu 12 B 18, 40 200 JYVÄSKYLÄ, Finnlando. La unua numero aperos ĉi-jare kaj la dua, kiun redaktas Jaan Ojalo, komence de venonta jaro. Pli malfrue venontjare aperos du numeroj sub mia redaktado.



Planlingva elitismo kaj kultura imperiismo

Recenzo de Bernard Golden

INTERLINGUA kontraŭ Esperanto - ankoraŭ unu atako

F.P.Gopsill, eks-esperantisto kaj nun fervora adepto de INTERLINGUA, estas la aŭtoro de 282-paĝa anglalingva libro tiotitolita *International Languages - a Matter for Interlingua* (Internaciaj Lingvoj - Afere por Interlingua), kiu estis eldonita de British Interlingua Society, Sheffield, Anglio, en 1990). La celo de la aŭtoro estas demonstri, ke Esperanto posedas multajn difektojn kaj INTERLINGUA estas pli bona planlingvo. Ekde 1951, kiam INTERLINGUA oficiale naskiĝis, membroj de ĝia movado provis konvinki la publikon, ke INTERLINGUA estas la solvo de la monda lingvoproblemo. Ĉiuj streboj en la pasinteco fiaskis kaj la INTERLINGUA-movado daŭre dekadencis. La libro de Gopsill estas eble la lasta alvoko savi tiun kadavrigantan lingvon. Tion Gopsill faras per bagateligo kaj nigriĝo de Esperanto, kaj li ne hezitas tordi historiajn faktojn kaj prisilenti la sukcesojn de Esperanto.

En sia komparo de Esperanto kun INTERLINGUA Gopsill estas obsedata de la nocio de naturalismo kaj li daŭre marteladas la punkton, ke la skemismo de Esperanto faras ĝin sentaŭga lingvo por internacia uzo; male, INTERLINGUA estas la idealala formo de internacia planlingvo, ĉar ĝi estas naturalisma. Tamen, klera leganto, kiu atente legas la priskribon de la gramatiko kaj morfologio de INTERLINGUA, baldaŭ komprenos, ke "naturalismo" signifas kaŝon, ĉar morfologio de INTERLINGUA baziĝas sur neregulaj

formoj venantaj de la nature evoluintaj latinidaj etnolingvoj. Plue, Gopsill ripetas ĝisnaŭze, ke la vortprovizo de INTERLINGUA estas internacia. Ankaŭ tie ĉi oni devas kompreni, ke "internacia" signifas, ke la lingvo estas nek supernacia, nek transnacia, sed simple interlatinida. Efektive, INTERLINGUA konsistas el leksika materialo venanta de la latinidaj lingvoj, precipe la sudaj lingvoj de tiu ĉi branĉo, la itala kaj hispana aŭ portugala.

Gopsill akcentas, ke INTERLINGUA estas legebla je la unua vido, sed devas esti evidente, ke temas nur por homoj, kiuj parolas aŭ lernas la fontlingvojn de la INTERLINGUA. Ĝuste pro tio ili formas specon de lingva elito. Gopsill ne haltas tie. Li atribuas al la lingvoj de okcidenta Eŭropo - la Okcidento - mondvastan kulturportantan rolon kaj tiel proponas novan formon de lingva imperiismo, en kiu la vehikla lingvo de tekniko, scienco kaj progreso fariĝas planlingvo. Gopsill bazas tiun vidpunkton sur sia konvinko, ke ekzistas multaj kulturoj en la mondo, sed estas nur unu civilizo, la okcident-eŭropa. Pro sia elitisma sinteno Gopsill rifuzas akcepti plurismon de civilizoj, kiuj, eĉ se ili alprenas la okcidenteŭropan sciencon kaj teknikon, povas konservi siajn proprajn spiritajn valorojn. Tiuspeca kultura imperiismo klarigas, kial la INTERLINGUA-movado post 40 jaroj da propagandado ankoraŭ ne sukcesis vekti intereson en Azio.

La historio de la demokrate orientita Esperanto-movado estas tute alia.

František Halas (1901 - 1949)

Pluvo en novembro

Tiela akvo
akvo trista akvo torturata
kiel tiu akvo
en kiu Pilato siajn manojn estis lavanta

Tiela akvo falas

Kaj kion vi volus
gis la koro vi nuba
kiam tiela akvo falas

Kaj mi volus
la konsolan eron da ino nuda
kiu min ankoraŭ amas



Paŝoj

Svenantaj paŝoj lontane
al kiu vi apartenas
kiel ni amis vin Tamen
vi tion en scion ne prenas

Ĉu vi rilatas al inoj
inklinaj al ni sincere
tremi kaj ne difini
kiu ĵus iris pretere

Ŝi, iris kaj ne plu revenos
do jes ŝi restu pasinta
sopiron ne forprenos
eĉ amo dume mortinta

Svenantaj paŝoj lontane
al kiu vi apartenas
eble ni amis vin Tamen
vi paŝas vi efemerus

(el la ĉeĥa trad. Josef Rumler)

Semajno en Roterdamo

La redaktoro de Starto estis invitita travivi sepon da tagoj en la oficejo de UEA en Roterdamo dum la dua septembra semajno. La domo situas en la malnova urbocentro, kie ĉiuj domoj memorigas la pentraĵojn de malnovaj nederlandaj majstroj el la 17-a jarcento (Vermeer, Terboch k.a.). De la ĉefa fervoja stacidomo necesas iri dek minutojn rĉkten al Nieuwe Binnenweg (Nova Interna Vojo) kaj poste dek minutojn dekstren al la domo n-ro 176. Al UEA apartenas la dekstra duono de la konstruaĵo, kiu estas kvar-etaĝa, enkalkulante ankaŭ la teretaĝon, kies planko troviĝas unu metron sub la nivelo de la trotuaro. Maldekstre de la luksa vitra enirpordo allogas la atenton granda montrofenestro, donanta imponan enrigardon en la librovendejon. La murojn kovras bretaro plena de libroj - 3800 titoloj. Jes, tri mil okcent! Ĉiuj en Esperanto aŭ pri Esperanto. En tri aliaj teretaĝaj ĉambroj estas deponitaj paketoj kun rezervaj libroj. Plie oni tie trovos reprezentan ĉambron Zamenhof kun video-televidilo, fotorivelejon, kompostan komputilon kaj grandan komputilon organizan - kun ĝi estas kontaktita deko da terminaloj en la tuta domo (terminalo estas fakte nur komputilaj klavaro kaj ekrano sen komputila "cerbo", kiu estas nur unu komuna). En la komputilo oni trovos membrobazon, financojn, staton de librostoko, la redaktoro tie entajpas siajn artikolojn, la oficistoj leterojn k.s.

En la unua supra etaĝo bonvenigas la vizitantojn la kancelario de la ĝenerala direktoro de UEA kaj leter-ekspedejo ekipita per kopimaŝino, lasera




La sidejo de UEA

presilo, telefakso kaj du terminaloj. En la apuda ĉambro rezidas financistoj. La duan etaĝon okupas en du ĉambroj la biblioteko Hodler - ĝi enhavas preskaŭ ĉiujn eldonitajn Esperantajn librojn (krom tiuj, kiujn la eldonintoj forgesis sendi al UEA), aranĝitajn laŭ la eldonjaro kaj enkadre de la jaro laŭ alfabeto ordo de la titoloj (ne de la aŭtoroj). En tiuj agrablaj ĉambroj laboras kvin da oficistoj, inter ili ankaŭ la redaktoro de la revuo Esperanto. La plej supran etaĝon prilokas kelkaj el la laborantoj de UEA. Proksimume dek kvin da personoj en la UEA-oficejo vivas kvazaŭ en fa-

milia amikeco, kiun fortigas komunaj lunĉoj en la teretaĝa kaŝĉambro kun bonhumora konversacio.

Roterdamo estas la plej granda haveno en la mondo (32000 ŝipoj jare), super ĝiaj kanaloj ofte arkas levpontoj, de kiuj oni povas spekti ŝipojn kvazaŭ en filmo. Mankantaj montojn kaj montetojn penas anstataŭi krutaj ŝtuparoj en domoj kaj pluraj turantaj konstruaĵoj, ekzemple la universitato Erasmus aŭ komerca centro de la Eŭropa Komunumo. En la urbo svarmas nigruloj, mulatoj, azianoj kaj iliaj amindaj ĉarmaj infanetoj, sed tute mankas rasistoj. Apud torento da aŭtomobiloj rajdas biciklistoj sur speciala vojo inter la trotuaro kaj ŝoseo. Librovendejoj preskaŭ ne ekzistas, nur unu granda librodomo en la urbocentro. La televido prezentas dek tri kanalojn, sed ĉiu el niaj tri estas pli bona ol tiuj dek tri



Librovendejo

komune. Ni orientanoj ofte troigas niajn iluziojn pri la okcidento. Al UEA venis nova libro el Litovio kun pardonpeta letero pri la malbona poligrafia nivelo kulpe de kvardekjara komunisma totaleco - ĉiuj oficistoj ridis, ĉar la libro apartenas al la poligrafie plej bonaj, kiujn esperantistoj eldonas. Tamen Nova Esperanta Krestomatio eldonita de UEA estas bela libro, por ni interesa pro fragmentoj el Ŝvejk (traduko de Knichal) kaj Seifert. La libro estas por ni iom multekosta (57 guldenoj, kurzo 1 guldeno = 15 kronoj), sed la salajroj en Nederlando estas en guldenoj proksimume la samaj kiel ĉe ni en kronoj. Kaj ankoraŭ unu novaĵo: la membrotito de UEA estos 600 kronoj.

(mm)



Laborloko

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1992

UEA denove invitas verkemajn esperantistojn pertopreni en la Belartaj Konkursoj, kies kadro ĉi-foje estas aparte loga; ja la rezultoj estos anoncigitaj en Vieno, unu el la mondaj ĉefurboj de kulturo kaj arto.

La konkurso konsistas el sep tradiciaj branĉoj kaj, eksperimente por la dua fojo, el vidbenda branĉo. La premiaj monsumoj estas plialtigitaj. La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de la infanlibroj) de publikitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Longo ĉirkaŭ 400 x 65 tajpospacoj. Premio Luigi Minnaja (unu).

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin (unu).

Fotografiaĵo: Temo ligita kun Esperanto aŭ kun tiu de la UK en Vieno. Tri premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro aperinta en 1991. Unu premio.

Alsendo de la konkursaĵoj: La konkursaĵoj por poezio, prozo, teatraĵo, eseo, kaj kanto estu senditaj en kvar ekzempleroj al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ili devas alveni plej malfrue la 31-an de marto 1992.

Por fotografiaĵoj kaj vidbendo oni sendu unu ekzempleron al tiu adreso por alveni plej malfrue la 1-an de julio 1992.

Por la branĉo de infanlibroj la eldonejoj sendu po tri ekzempleroj de la libro al la sama adreso por alveni plej malfrue la 31-an de marto 1992.

La konkursaĵoj portu indikon pri la branĉo, por kiu ili estas celitaj, kaj (escepte la vidbendoj kaj infanlibroj) estu signitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto estu enfermita la vera nomo kaj adreso de la konkursanto. Oni aldonu 5 internaciajn respondkuponon por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

Premioj: Unua premio 360 gld.; dua 252 gld.; tria 144 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld.; Premio An-okin 360 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 252 gld.; plu enskribo sur la pokalon Henry Harabagiu. Infanlibro de la Jaro 756 gld. Ĉiu premiito ricevis diplomon.

Detala regularo haveblas ĉe la supra adreso kontraŭ unu respondkuponon.

Vojtěch Alberto Friš:

Kiel mi fariĝis kaktisto

(el la libro de Karel Crkal: Lovec kaktusů, Akademia 1983)

Kiel proksimume okjara knabo mi rajdis sur triciklo, kiel dekjarulo sur la tria biciklo kun pneŭoj, kiu venis kiel novaĵo/* el Anglujo en Bohemujon, marko "New-Rapid", kaj estante do dekjara mi "trainis" por konkursoj de Sparta en Karlín-kvartalo. Tie mi konatiĝis kun tiama kurĉampiono, nuna pentristo Hron. Post unu jaro la kurejo en Karlín estis po ni malgranda kaj ni transiris al la kurejo de Žižkov. En Žižkov oni vendis ovojn je du krejce-rojn por dekkvino pli malkare ol en Prago.

Kiel tio rilatas kaktajn? Tamen la malmultekosteco de ovojn en Žižkov kaj konscio de ofica devo de iu oficisto de la Praga nutraĵ-imposto estis kaŭzoj de mia komenco pri kaktokultivado.

Ni ne devas forgesi, ke en tiu tempo estis belaj freŝaj ovojn aĉeteblaj ne sole en Žižkov, sed ĉie. Mi devas ankaŭ menci, ke ni ĉiuj, kiuj ĉiutage kunvenis sur la kurejo de Žižkov, posedis malpezajn vetkurajn biciklojn, kaj malgraŭ tio, ke ni estis ankoraŭ infanoj kaj malpezaj, eltenus niaj veturiletaj eĉ ne la nuntempan, tiom malpli tiaman Pragan pavimon. Pro tio ni iradis piede ĉe la rando de trotuaro anservice. Per unu mano ni kondukis la biciklojn kaj en la alia portis ĉiu tre singarde saketon kaj en ĝi precize nombritajn 14 ovojn.

Ĉe la Praga limo oni pagis nutraĵ-imposton nur ekde dekkvino kaj pli, kaj ĉar ni iam estadis eĉ tridek kaj iris komune, flaris en tio unu el la

impost-gardistoj grandan kontrabandon kaj suspektis nin, ke ni provizas ĉiujn butikistojn de la "akcizita" Prago. Se tio okazus en nia tempo/**, estus pri tia suspekto nenio miriga, sed tiam kredi, ke iu sendas tridekon da junuletoj kun bicikloj kontrabandi ovojn en Pragon, atestis pri la malsana fantazio de la bona viro. Li dediĉis al ni, kompantindulo, grandegan laboron. Li rekalkulis la ovojn al ĉiu speciale kaj dume aliaj vere "kontrabandis", samtempe pluvigis sur lin sarkasmoj el trideko da junaj buŝoj. Ĉie li trovis nur 14, precize dek kvar pecojn zorge elektitajn, nenie dekkvinon.

Li estis senpova kaj lia vizaĝo nubiĝis de tago al tago ĉiam pli. Eĉ ne helereto de tiuj damnitaj "luciperistoj" por la nutraĵ-imposto malgraŭ tiom da laboro. Sed li ne povas ĉesi, ĉar se iu tamen havus dekkvin? La butikistoj en Žižkov vendas po dekkvinojn - sed ĝuste la dekkvina ovo estis nia salaĵo kaj ni ĉiutage eltrinkis ĝin nekuirita post la trejnado. Por tio ni liveris al niaj familioj kaj konatoj malkarajn ovojn el Žižkov.

Sed alvenis tago, kiam li atende alrigardis nin jam de malproksime kaj lia vizaĝo radiis de ĝojo. Ni sentis, ke io okazos. Kaj vere okazis. La unua proksimiĝis kaj nia gardisto abrupte lin: "Kion vi portas?" Samtempe li batis per la pugno la papersaketon. Ni ne ekpensis, ke li kuraĝus fari la samon al ĉiuj, sed ĉe la dua li ripetis sian demandon jam pli singarde kaj ĉe la lasta li forgesis sian rolon kaj ridis. Ridis ankaŭ la ĝendarmo kaj

/* en la jaro 1892

/** la unua mondmilito

preterpasantoj kaj ni malgaje ekzamenis niajn saketojn, en kiuj likvo estis miksa kun ovoŝeloj. Por eviti la mokadon, ni retiriĝis en parkon kaj tie ni kungrupiĝis por preventa militkonsiliĝo. Aperis propono denunci la viraĉon, sed plejparto ĝin rifuzis, ĉar ni sentis, ke ni verŝajne trompus la leĝon, kaj mankis al ni scio pri niaj rajtoj. Nia devizo estis: venĝo; ridindigi lin antaŭ la ĝendarmo kaj publiko kiel lin.

Ĉiuj estis taskitaj mediti pri la afero kaj morgaŭ prezenti proponon. Sekvan tagon ni trejnis tre malmulte, ni pli ofte interkonsiliĝis kaj traktis pli malpli realigeblajn projektojn.

Se temis pri la diablaĵo, mi ĉiam estris. Mian planon mi sekretigis, sed mi postulis, ke la unuaj du portu saketon kun ovo kiel ordinare. La necesan kapitalon ni kunkolektis el ĉiuj poŝoj egalrajte kaj senescepte. Mi iris kiel la tria.

Ĉe la viadukto ili atendis min, kaj mi forkuris al Hron en Karlín. Hron tuj konsentis kaj pruntis al mi unu kaktan, kiun la maljuna sinjoro kultivis jam dum multaj jaroj kun granda amo. La ekzemplero estis bela, *Echinopsis eyriesii*. Mi enpakis ĝin en maldikan paperon, stariĝis en la vico kiel la tria kaj la procesio ekmoviĝis.



Kio sekvis, scias ĉiu imagi pli bone, ol mi kapablas pri-skribi, tial mi duondiros nur la finon. La Pragaj "akcizistoj" estas akruvidaj homoj kaj tiu nia certe vidis sur niaj vizaĝoj, ke ni preparis venĝon. Li do estis singarda, sed kiam la unua kaj la dua transportis "trans la linion" nur miksitaj ovojn kaj la ĝendarmo kaj la publiko ridegis plengorĝe - li frapegis kun vera entuziasmo.

Mi aŭdis nur: "Kion vi ...?"

Li ne findiris "... portas?" kaj anstataŭe eltorentis el lia buŝo vico de plej sukaj blasfemoj, kiujn oni enŝtus al li eĉ en la tiama Podekalí-kvartalo.

La preterpasantoj haltis, la ĝendarmo serioziĝis kaj volis interveni kontraŭ mi, sed kiam mi seriozmene elpakis florponton kaj demandis, ĉu oni multe devas pagi por kaktaj, diseŝiĝis ĉirkaŭe la homara ridego.

La ceteraj transiĝis sen kontrolo kaj de tiu tempo ni kontrabandis ovojn publike, sen esti ĝenataj de iu.


La kaktano restis staranta en mia ĉambro malantaŭ la fenestro - mi ne plu scias kial. Aŭ mi ne havis specialan bezonon iri al Karlín, aŭ Hron ne plu interesiĝis pri la kaktano, por ke la "maljunulo" ne malkaŝu la kulpinton de la baldaŭ rimarkita perdo. Mi ne plu memoras, sed ĝi tre longe staris sur fenestro kaj neniu turnis al ĝi sian atenton. Eble ĝuste tial, ke ĝi havis malmulte da akvo kaj multe da sunbrilo, ĝi komencis kreskigi vilajn branĉojn, kaj kiam mi foje observis ilin pli detale, mi komprenis, ke ili estas grandaj burĝonoj. Mi tuj aspergis la planton kaj post kelkaj tagoj malfermiĝis 3 belegaj floroj: brile blankaj, pli ol kvaronmetraj tuboj, plenaj de regule aranĝitaj spirallaj stangetoj. Ĝi estis por mi

novaĵo. El tia misforma, fiaspekta planto, kiu valoris por mi nur kiel venĝilo, elvokiĝis belaĵo ĝis nun nekonata en la naturo, al kiu mi de infanaĝo dediĉis grandan atenton. Mi trasidis plurajn tagojn ĉe la kaktano, ĝis la floroj velkis. Mi observis la stangetojn, okulsekvis muŝojn kaj abelojn, kiel ili transportas la polenon de pistilo al stigmato, kaj en mi mem mi rimarkis ŝanĝigon: mi fariĝis kaktisto, kvankam tiam mi ankoraŭ ne konsciis tion.

La kolekto de poŝtmarkoj flugis en angulon, ŝkaraboj kaj papilioj al la subtegmentejo. Mi ĉesis bredi raŭpojn, observi la evoluon de libelaj larvoj en akvario, jes eĉ la sporton mi neglektis kaj nur tion mi epinsecerĉis, kie mi akirus branĉojn de kaktano.

(tradukis M. Malovec)

Neniu respondecas pro sia vizaĝo...



...sed oni certe respondecas pri siaj intencoj!

KORESPONDI DEZIRAS

El Litovio:

*** Diversegaĵaj gelnantoj deziras korespondi en Esperanto kun ĉeĥaj aŭ slovakaj gelnantoj. Respondo estas garantiata. Leterojn sendu al instruisto: Antanas Gvildys, JURBARKAS, Box 41, Lietuva 234 430 ***

El Ĉinio:

*** Yang Jinqi, Changzheng Quichechang, 054004 XINGTAL, Hebei, kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj pri diversaj temoj *** Wang Aijun, P.K. 532/101, 610003 CHENGDU, Sichuan ***

El Pollando:

*** Grzegorz Pokrzywnicki, P. BOX 165, PL-81969 GDYNIA 2; 35-jara komencanto; li interesiĝas pri geografia, historio, naturo, kaj pri literaturo *** Cecylia Niewiadomska, ul. Westerplatte 53/D/13 76-200 SŁUPSK, 29-jara telefonistino, ĝi interesiĝas pri filatelo kaj turismo, volas interŝanĝi bildkartojn ***

El Ĉeĥoslovakio:

*** Irena Vernerová, Kunštátská 1137/III, 290 01 PODEBRADY, 32-jara oficistino, komencantino; ĝi interesiĝas pri geografia, historio kaj muziko, volas interŝanĝi bildkartojn ***

Majorie BOULTON:

"Mi ofte sentas, kiam mi verkas angle, ke mi verkas por angloj.

Sed kiam mi verkas Esperante, mi sentas, ke mi verkas por la mondo."

(por La Espero, 6-8, 1958)

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 1

*** STARTO ***

presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10,
110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare.
Respondeca redaktoro: Miroslav Malovec;
administrato: Karel Daněk, STARTO, poŝtfako 425,
CS- 660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio. Abonebla ĉe niaj
perantoj, ĉe UEA, aŭ rekte ĉe nia asocio.

Nepravdivulnaĵo vĉestniko Ĉeskeho esperantskeho
svazu. Vychází 6x roĉně. Obdrží členové svazu.
Odpovědný redaktor: Miroslav Malovec;
administrátor: Karel Daněk, STARTO, pošt.p. 425.
660 25 Brno 2.

NOVINOVÉ
DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Hodonín 1
Povoleno JmĚS Brno,
č.j. P/3-6847/91
ze dne 28.8.1991.